
*Sendu novaĵon al AE kaj la mondo. Ĉiusemajna novaĵletero.* rspring@tpg.com.au

# Aŭstraliaj  Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj





**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 20/06/2019 Kvarcenttridekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Rapide ekrigardu ĉiujn titolojn.


## Legu tiujn kiuj interesas vin

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

## Entute 833,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **322,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **302,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **209,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Gramatika serio "La Verbo en P.A.G.". N.ro.73






La tri simplaj agotempoj estas la prezenco, la preterito, kaj la futuro. Ilin distingas la simplaj finaĵoj -as, -is, kaj –os. En paragrafoj 193 ĝis 196 P.A.G. priskribas ĉiujn adjektojn kiuj subdividas aŭ rilatigas la tempopunktojn. Mi mencias nur la kelkajn, kiuj kelkfoje okazigas problemon.

P.A.G. senkritike mencias malĝustan ekzemplon de Zamenhof: "Vaŝington estis naskita la dudekduan de Februaro": tio signifas AŬ ke li je tiu dato jam vivis pro antaŭa naskiĝo, AŬ ke je nemenciita posta dato li vivis pro naskiĝo je la antaŭa dato de la dudekdua de Februaro. Por diri ke li naskiĝis, do estis naskiĝanta aŭ naskata je tiu dato oni devas diri ke "li naskiĝis aŭ estis naskiĝanta aŭ estis naskata aŭ, plej bone, ke li naskatis je tiu dato".

Poste P.A.G. ĝuste mencias, ke se la substantivo ne mem indikas iun ajn tempon, oni uzas "ĉe tagmanĝo", kie "ĉe" signifas "en la tempo de".

(daŭrigota) *Marcel Leereveld*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

.Sendu novaĵon al AE kaj la mondo. Ĉiusemajna novaĵletero. rspring@tpg.com.au

# La Manlia Esperanto-Klubo







Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm. Bavarian Beer Café, Manly Wharf Unu taso da klubpagata kafo atendas vin. La 15a de junio estis la tria sabato. Venis Roger Springer, Michael Peters, kaj Chris Holliss. Ni legis artikolon en AE428 pri aŭstralia kulturero. Tre interesa lingvo kaj ankaŭ klarigo de la aŭstralia kulturo. *Roger Springer*.

# Mesaĝo de Marcel.



Kara Roger!

Hodiaŭ mi sendis al ci dek-unu novajn P.A.G.'ojn, nrojn 73 ĝis kun 83. Mi supozas ke la unua estos por A.E., n.ro 431, do ĝustatempa.

Nur laboreti en la ĝardeno forgesigas iomete la doloron, kiu estas sama kiel ĉe la komenco antaŭ tri semajnoj.

Mi intencas sendi artikolon por 431, se mi ne ricevos plian malsanon, ekzemple la gripon, kiu sendube mortigos min. (Nun vidu malantaŭe)

La vintra temperaturo nun en Melburno ne estas tre malvarma. Amike, *Marcel Leereveld*.

# Floroj defias en mia ĝardeno.



## ĈU RESTI PRIMITIVAJ ?

Same kiel mi ne komprenas, ke spertaj Esperantistoj estas kontentaj fari gramatikajn erarojn, kaj persistas, same mi ne komprenas ke la homaro ĝenerale estas kontenta vivi en la laŭ mi malbonaj sociaj situacioj, kaj persistas ne voli fari ion por plibonigi la sociajn situaciojn.

Mi kompreni povas, ke homoj kiaj mi kaj miaj geamikoj preferas daŭrigi la vivon nunan sen laboregi por ŝanĝi la socian kunvivadon, ĉar ili ne suferas materie nun, sed kial milionoj suferas ĉiajn problemojn kaj vivas malfacile, tamen ne pretas agi por ŝanĝi la socion. Eble ili religie kredas, ke tio estas ilia nepra sorto, kaj ke ili ne rajtas ŝanĝi la volon de Dio aŭ de la naturo. Se ne, ili ja havus nian helpon, la helpon de multaj tiaj kiuj ne bezonas pliboniĝi.

**Homoj kiuj tre deziras renversi la egoisman socian sistemon nunan, kiaj mi kaj multaj aliaj, trovas** labori por tio tre malfacila, ĉar la homoj kiuj persone pli bezonas tian ŝanĝon estas tro letargiaj, tro malagemaj. Aŭ ĉu la menspoluciado ate de la homoj kaj organizoj regantaj la homaron estas tiom efika? Se tio estas la kazo, ni povas helpi detruante tiun menspolucion. Ĉi tiu okazas precipe en la gazetaro, la amasinformado, la laborejoj, kaj la registaroj. Tiu batalo kontraŭ la menspoluciado ŝajnas nuntempe multe pli facile farebla ol antaŭ jarcento, kaj tamen tiam ekzistis multe pli da entuziasmo kaj agemo por ŝanĝi la malbonan socion, ol ekzistas nun. Kial?



Kiuj povas doni la respondojn? *Marcel Leereveld.*

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

## DEFIANTAJ FLOROJ .

Ekzistas en Aŭstralio plantoj, kiuj por seksumi ne bezonas flugantajn insektojn, kaj kelkaj el ili do floras dum la vintro. La aliaj floras en la varma periodo de la jaro.

La tropikaj kaj subtropikaj plantoj povas flori en iu ajn parto de la jaro, do ankaŭ en la norda parto de Aŭstralio. Mi havas kelkajn tiajn kreskantajn en mia ĝardeno, sed en ŝirmataj lokoj. Ekzemple antaŭ tridek jaroj mi aĉetis, ĉar ili hazarde estis malmultekostaj, kvardek specimenojn da "Bougainvillea". En Melburno kelkaj fariĝas arboj, anstataŭ grimpi. Baldaŭ post plantado tridek-ses da ili mortis, ĉar ili ne ŝatas la malvarmon. Unu restanta plu defias la temperaturon kaj plu floras, kvazaŭ ĝi vivas en la tropikoj. Ĝi evidente opinias, ke ĝi rajtas flori kiam ĝi volas kaj ke la klimato devas adapti sin al ĝi, ĉar ankaŭ ĝiaj praavoj en la tropikoj rajtis flori kiam ajn ili volis. *Marcel.*



## MI DEFIAS LA EŬROPAJN LINGVISTOJN !

En lingvoj la verboj indikas kutime, kvankam ne ĉiam, sian signifon KAJ kelkajn el la eblaj aspektoj de sia uzo inkluzive de siaj funkcioj. Dum ekz. Substantivo kutime montras nur sian signifon, nome la signifon de la ulo, aĵo, aŭ eco kiun ĝi reprezentas, verbovorto enhavas kombinaĵon de signiferoj aldonitaj pro la cirkonstancoj de via uzo. Substantivo povas aldoni nur sian nombron (pluralo) kaj sian lokon en la frazo. Afiksoj ne aldonas, sed ŝanĝas la signifon de la substantivo mem. Verbo, per siaj finaĵoj kaj sufiksoj, enhavas plurajn ekstrajn informojn pri la cirkonstancoj en kiuj ĝi uzatas. Escepte de la Infinitivo, ĉiuj verboformoj enhavas, krom sian bazan signifon, samtempe signiferojn pri almenaŭ du cirkonstancoj en kiuj ĝi uzatas. En Esperanto tiuj aldonaj signiferoj indikatas per finaĵoj kaj per sufiksoj; en etnaj lingvoj ofte krome per ŝanĝo de la vokalo de la radiko *(sing > sang).* Se mi simple diras la vorton "tablo", vi nenion scias pri ĝiaj cirkonstancoj, sed se mi diras la vorton "manĝatis", vi jam scias ne nur la agon, sed ankaŭ ke ĝi rigardatas retroe, el la vidpunkto de la suferanto de la ago, kaj ankaŭ ke ĝi okazis en la pasinteco, kaj krome ke ĝi donatas kiel fakto.



Kvankam normale, kaj en Esperanto ĉiam, ĉiuj diversaj ekstraj signifoj montratas en unu vorto, en unu verbo, la hindeŭropaj lingvoj evoluigis unue la sistemon de predikativoj, kaj poste el tio evoluigis kombinaĵojn de verboj por indiki la ĉi supre menciitajn ekstrajn signiferojn. Tio ne okazis, aŭ ne okazu, en Esperanto. Ni nun do havas la situacion ke la etnaj lingvoj ofte uzas du aŭ tri apartajn verbojn por indiki, krom la bazan signifon, ankaŭ la ekstrajn cirkonstancajn signiferojn, per vortoj origine uzataj en predikativoj *(I have eaten the chicken = I have the chicken in an eaten condition.*)

Dum en la etnaj lingvoj plu uzatas simplaj verboformoj kiuj sole indikas ankaŭ la cirkonstancojn *(I took = Past Tense + Active Voice + Reality a taxi,* "Mi uzis taksion"), la tendenco estas uzi pli kaj pli da verboj konistantaj el du aŭ tri verboformoj, eĉ nun ankaŭ anstataŭ jam havataj simplaj verboformoj *(I WILL BE EATING at 6h00* – Mi MANĜOS je la sesa, kaj *I HAVE LOST my watch when in Rome* – Mi PERDIS mian horloĝon en Romo). Estas komprenebla, ke ĉiuj tiuj kombinaĵoj de verboj povus, teorie, esprimati en unu vorto, kaj ke

ni devas kompreni la kombinaĵojn kiel unu vorton aŭ unu ideon, enhavantan la normalajn signiferojn de verboformo (baza signifo + Tempo + Voĉo + aliaj aspektoj). Kaj ni devas enkalkuli, ke la signifo de la apartaj verboformoj ofte malsamas kiam ili uzatas sole, aŭ en aliaj kombinoj. Ekzemple "*have*" ne signifas "posedi" en "*I have returned*" nek la germana "*wurde*" signifas "iĝis" en "*Ich wurde empfangen*" (Mi ricevatis), (kiel en *"Ich wurde kalt*"). Pro tiu tialo la eŭropaj lingvistoj diras, ke la apartaj vortoj en la verbaj kombinoj ne havas propran signifon, sed havas kune alian solan signifon. Ĝis tio ili pravas, sed ili malpravas ke neniu el tiuj kombinpartoj aldonas certan signiferon al la tuto. Ekzemple ili asertas ke en "*He has eaten his porridge*" neniu el "*has eaten*" signifas la tempon aŭ la voĉon aŭ ion alian, sed ke nur kune "*has eaten* " signifas la pasinton aŭ la aktivon.

Ili malpravas, ĉar ili kontraŭdiras sin mem. Jen! Ili diras ke en *"He will come*" la vorto "*will*" alportas la signifon de la agtempo kaj "*come*" alportas nur la originan signifon de la ago, ĉar ĝi estas Infinitivo. Tial ili nomas "*will*" la helpverbo, kaj "*come*" la Infinitivo, EN TIU KOMBINO. Kaj tial ili diras ke "*eating*" en "*He is eating*" estas Prezenca (aŭ daŭra) Aktiva Participo, PRO LA FUNKCIOJ EN LA KOMBINO. (En aliaj situacioj tiu nun Prezenca Aktiva Participo povas esti Adjektivo aŭ Substantivo). Kaj se en "*We have eaten the chicken*" la vorto "*have*" (kun participo) alportas la signiferon de la Aktiva Voĉo kaj la vorto "*eaten*" alportas la signifon de la Pasinta Tempo, en "*The letter was (being) received at 10h00*" la vorto "*was*" alportas la signifon de la (Pasinta) Tempo kaj la vorto "*received*" alportas nur la signifon de la Pasiva Voĉo. "*received*" ĉi tie ne povus signifi la (pasintan) tempon, ĉar ĝi estas la sama en ĉiuj tempoj *(was, is, will be received*). Ĉar ĝi alportas nur la signiferon de Pasiveco, ĝia funkcio estas Voĉa kaj ĝia nomo do devas esti "Pasiva Participo". Same kiel "*the*" kaj "**to**" indikas, ĉu "*work*" estas substantivo aŭ verbo, same tiel " *have*" kaj "*be*" indikas ĉu "*received*" estas Pasinttempa Participo aŭ Pasivvoĉa Participo. Du el la tri participoj en la eŭropaj lingvoj. Estas nur hazardo ke "*work*" havas du funkciojn kaj do du nomojn kaj ke same "*received*" havas du funkciojn kaj do du nomojn. Ankaŭ same kiel "*singing*" havas tri funkciojn kaj do tri nomojn: Adjektivo, Substantivo, kaj Verbo.

Bonestu pruvi, ke mi malpravas! Jen la defio! Se ne, helpu min ŝanĝi la lingvistikan mondon! *Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Bondeziroj por Marcel



Vasil Kadifeli Mi deziras al kara Marcel rapidan resaniĝon....

Margaret Furness Aj, kompatinda Marcel! Tiu malsano estas vera aĉaĵo. Ĉion bonan al li.

Hermann Kroppenberg Mi elkore deziras al vi baldaŭan resaniĝon.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



## 3zzz 30 jaroj



Dum la monato junio la radiostacio organizas diversajn eventojn- malfermitaj pordoj, ekspozicioj, komuna vespermanĝo kun

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

dancado- por celebri la 30 jarojn de ekzistado de la radio .La unua elsendo estis elsendata la 18an de junio 1989.




Vendredon la 14an , la kunvokanto de ĉiu grupo estis invitita por ricevi atestilon de la manoj de diversaj politikistoj, kiuj subtenas la multkulturan radiostacion . Ĉeestis por reprezenti la Esperanto grupon Svetislav Kanacki , la inicianto de tiu grupo, kiu daŭre laboras malantaŭ la kurteno kaj la nuna kunvokanto , Franciska Toubale.

Esperanto estas disaŭdigata ekde la komenco . Se vi taksas ke valoras daŭrigi tiun laboron , helpu per membriĝo al radio 3zzz, per sendado de kontribuaĵoj ĉu skribitaj ĉu voĉaj . Se vi loĝas en Melburno kial ne pligrandigi la elsendan teamon, kiu maljuniĝas . La aĝo de la nunaj teamanoj estas inter dudek iom da jaroj ĝis cent unu.

Kontaktu nin je 3zzzesperanto@gmail.com *Franciska Toubale*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Ĉu vi jam vidis krokodilon violoni? 🎻 🐊



**Kiajn feriojn VI deziras?**

- ĉu agrablajn?
- ĉu amikajn?
- ĉu instruajn?
- ĉu komfortajn?
- ĉu naturajn?
- ĉu artajn?
- ĉu ripozajn?
- ĉu aktivajn?

**Haltu minuton kaj pripensu:**

- imagu belan 5-kordan violonon en la sublima halo de la kastelo!
- imagu koncerton kaj dancon sur la nobela ligna planko!
- imagu muzikan aperitivon en la kastela parko per irlandaj keltaj melodioj!
- imagu amikan kantadon de francaj konataj kanzonoj kun violona akompanado!
- imagu rondan kaj paran popoldancadon por senstreĉe ekzerci vian korpon en ritmo!
- imagu amuzan spektaklon de klaŭno kun violonista manpupo!
- imagu senpagajn inicajn kursojn de violono kun malgrandaj violonoj por infanoj sed ankaŭ por vi!

**Kaj ĉio tio en Esperanto!**
**Por plibonigi vian paroladon kaj vian komprenon.**
**Ĉu vi jam vidis krokodilon violoni?**

Mi estas francino naskiĝinta en Parizo SED mi ne havas francan akĉenton kaj mi promesas korekti viajn francismojn.

Pliajn informojn ne hezitu peti de Fransoazo (Françoise Noireau) telefone: +336 09 12 03 74 aŭ retmesaĝe: fransoazo@gmail.com

**Tiu anonco invitas vin al dektaga restado en la kastelo Greziljono inter la 6a kaj la 16a de aŭgusto. Vidu detalojn en la retejo: http://gresillon.org/s4**

*Françoise NOIREAU*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## UEA KONGRESOS EN BELFASTO, NORD-IRLANDO, EN 2021

Por la 106-a Universala Kongreso, post du jaroj, la Estraro de UEA elektis la "smeraldan insulon", Irlando, kiel kongreslandon. La Universala Kongreso la unuan fojon okazos en tiu parto de Eŭropo. La gastiga urbo estos Belfasto, la ĉefurbo de Nord-Irlando. Grava haveno kaj pordo al la belega nord-irlanda marbordo, Belfasto suferis dum la lasta jarcento pro armita politika konflikto, sed nun estas konsiderata kiel unu el la plej sekuraj urboj en la brita insularo.



UEA traktis rekte kun la urbo kaj ricevis tre favoran oferton de kongresejo en Queen's University (la Reĝina Universitato).

La 106-a UK estas planata por okazi de la 17-a ĝis 24-a de julio.

Kun amikaj salutoj, *Katja Steele*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Kastelo de Grésillon



Kara Esperantistoj, Karaj Aktivuloj,

Jen priskriboj de novaj kursoj prezentotaj de mi por spertaj Esperantistoj, amikoj de UNESKO, kursgvidantoj kaj aktivuloj en la Esperanto-Movado -- antaŭ kaj post la Universala Kongreso -- en la bela, alloga, unika Kastelo de Grésillon en Francio. Mi esperas, ke vi ŝatos ĝuste tiajn kurso-enhavojn, kiujn mi plene priskribas en pluraj artikoloj en la revuo Esperanto, kaj en la fakĵurnalo IPR, Internacia Pedagogia Revuo de ILEI. Ĉi tiuj kursoj estos prezentitaj ne nur por lerni la enhavon de la materialo, sed ankaŭ por lerni kiel uzi ilin poste en VIAJ lokaj kluboj, lokaj asocioj de Esperanto. Tio estas, vi lernos kiel lernanto, kaj vi lernis ankaŭ kiel iĝi kursgvidanto, se vi volas, de tia materialo Jen sube iom da informo pri la antaŭ- kaj postkongresaj kursoj en la Kastelo de Grésillon.



**1 UNESKO-Kuriero, Pensiga Kurso.**

Legi, Kompreni, Prezenti, Interdiskuti.

*Sendu novaĵon al AE kaj la mondo. Ĉiusemajna novaĵletero.* rspring@tpg.com.au


Unu el la ĉefaj atingoj de la Esperanto-Movadoj en la lasta jardeko estas la eldonado de revuo de UNESKO en Esperanto. Sed kiel ni povas utiligi nun UNESKO-Kurieron en la klasĉambro, en niaj lokaj grupoj, por plenkreskuloj? En Somero antaŭ la Universala Kongreso en Finnlando, inter la 6a kaj la 18a de julio, en la bela Kastelo de Grésillon, ni esploros ĝuste tiun temon, kun la espero, ke vi mem povos poste starigi tian kurson en via loka klubo, aŭ utiligi la enhavon de UNESKO-Kuriero, esperante kaj nacilingve, por antaŭenigi la celojn de Esperanto kaj de UNESKO en via urbo, en via lando. Artikoloj en la revuo de Esperanto (Februaro, 2018), kaj la ĉefartikolo de la Internacia Pedagogia Revuo de ILEI (2019-1) parolas pri la kurso gvidata de Dennis Keefe kaj en Azio kaj en Eŭropo. Iru al la retejo de la Kastelo: gresillon.org/s2

## 2 Charlie Chaplin, Pensiga Kurso



Mi vid(ig)is, Mi rid(ig)is, Mi pens(ig)is, Mi lern(ig)is.

Inter la jaroj 1915 kaj 1936, la fama filmisto Charlie Chaplin, Ĉoĉo, kreis dekojn da altkvalitaj filmoj, kiuj estas surprize kaj mirinde efikaj por paroligi gelernantojn en niaj kursoj por komencantoj, komencintoj kaj eĉ por spertaj Esperantistoj. Estas iom paradokse, ke senparolaj filmoj kreas tiom da emoj paroli (multe pli ol teskto kaj bildoj) en esperantaj kursoj, Kial? Parte ĉar la ideoj sen vortoj devas klare prezentiĝi surekrane, kaj parte ĉar Chaplin estas geniulo pri homa esprimado kiu mense kaj kore tuŝas nin. Faka artikolo pri ĉi tia kurso troviĝas en IPR, Internacia Pedagogia Revuo (2017-4). La kurso disvolviĝos en aŭgusto, inter la 6a kaj la 18a, post la Universala Kongreso en Finnlando. La plej rigida, sed serioza, kurso de Dennis Keefe. Iru al la retejo de la Kastelo: gresillon.org/s4



*Dennis Keefe*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★






★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# LA MEDIO



Pri la damaĝo kaŭzita al la medio de plastaj sakoj.
Kiuj estas pli kulpaj? La fabrikoj aŭ la uzantoj?
Eble profito pli gravas ol la medio.
Kion vi opinias?

*Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***